

Enhavo

- **anoncoj**

Unua "virtuala" estrara kunsido; LK-2014 en Viktorio, Brita Kolumbio; Mekaro-2014 en Ŝerbruko, Kebekio; Traduku usonan klasikajon por Liro-2013; Nova eldonajo; Free downloads from the *retbutiko*; Forpaso: Barbara Doris COLT; Korespondi deziras

- **An interview with William R. HARMON**
intervjuo - Ĵenja Amis

In honor of Bill Harmon, we're reprinting portions of his interview with Ĵenja AMIS in 2005.

- **Mekaro-2014 en nova urbo**

anoncoj

En 2014 la Mez-Kanada Renkontiĝo (Mekaro) okazos en urbo kie ĝi neniam antaŭe okazis: Ŝerbruko (Sherbrooke), Kebekio.

- **Ju pli multe... des pli bone**

de la prezidanto - Orlando E. Raola

Ankoraŭ iomete laca sed tute feliĉa, mi ŝatus rakonti al vi pri mia aventuro dum la semajnofino, kiam mi havis la eksterordinaran ŝancon partopreni la 13-an Meksikan Kongreson de Esperanto en la ĉefurbo de nia suda najbaro.

- **ESPDIC: The Esperanto-English Dictionary Project**

libroj - Paul Denisowski

The purpose of the ESPDIC project is to create an electronic Esperanto-English dictionary. Volunteers are welcome.

- **Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado**

libroj - François Lorrain

La rakontoj ne celas ĉefe infanojn, sed male homojn el ĉiuj aĝoj. Kelkaj el la rakontoj partoprenas, stile aŭ enhance, en la buŝa popolrakonta tradicio tiam tre disvastigita tra la tuta franca Kanado: ofte, dimanĉe postmese, aŭ dum longaj vintraj vesperoj, kunvenis homoj por aŭskulti rakontiston, lokan aŭ vojaĝantan.

- **“Signo”**

senintenca esperantaĵo?

Tiel konvena estas la nomo de tiu ĉi skribilo-marko, ke ni devas demandi: ĉu ĝi vere estas *senintenca* esperantaĵo aŭ ne?

- **“Povos”**

senintenca esperantaĵo?

Ĉu vi volas razi al vi la kruojn? Helpe de *POVOS*, vi povos!

ISSN: 1056-0297

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2013:5 (sep-okt)

American Esperantist

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2013:5 (sep-okt)



Phil Dorcas



Orlando Raola



Gary Grady



Steven Cybulski



Chris Nelson



Jessica

Ĉi-numere:

- De la prezidanto: Impresoj pri la 13-a Meksika Kongreso
- ESPDIC: The Esperanto-English Dictionary Project
- ...kaj multe pli!

Unua estrara "virtuala kunsido" okazas per Interreto

Unua “virtuala” estrara kunsido


Por plenumi estraran interkonsenton de nia lasta kunsido kadre de la kongreso en Raleigh, la Estraro de E-USA havis sian unuan virtualan kunsidon je vendredo, la 25-a de Oktobro. En nia kontinente granda lando, eĉ trovi taŭgan horon por tiutipa kunsido estas iom tikle, sed ni sukcesis renkontiĝi je la 5-a ptm en la orienta marbordo, je la 2-a en la okcidenta. Malgraŭ tio, ke ne ĉiuj estraranoj havis la ŝancon partopreni, ni havis kvorumon por okazigi decidopovan kunvenon.



Ĝi estis vere fruktodona kaj ni esperas pliperfektigi nian kapablon havi plej altkvalitan agadon tiamaniere. La venonta kunsido sur la reto okazos en Januaro. La servo uzita estas GoToMeetings.com, sed ni pretas ankaŭ esplori aliajn (eble malpli kostajn) eblecojn.

LK-2014 en Viktorio, Brita Kolumbio

En 2014, la Landa Kongreso de Esperanto-USA vojaĝos al la okcidenta marbordo de Kanado! Nia ĉiujara kunveno okazos 11-13 Julio en Viktorio, la ĉefurbo de Brita Kolumbio. Pli da detaloj sekvas en venonta numero.



Mekaro-2014 en Ŝerbruko, Kebekio

Ankaŭ en Kanado okazos la Mez-Kanada Renkontiĝo (Mekaro), en Ŝerbruko (Sherbrooke), Kebekio. Ĝi komenciĝos en Majo ĉe la universitato *Bishop's*, ne malproksime de la usona landlimo. Pli da detaloj sekvas ĉi-numere.



Traduku usonan klasikaĵon por Liro-2013

La redakcio de la gazeto *La Ondo de Esperanto* invitas vin al tradicia literatura konkurso *Liro*.



Ĉi-jare, en la anglalingva fako de la konkurso oni proponas la mallongan novelon *The McWilliamses and the burglar alarm* de Mark TWAIN. La teksto estas libere elŝutebla de Project Gutenberg [http://gutenberg.org/files/3186/3186-h/3186-h.htm#link2H_4_0015].

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de via konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina GORECKA (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). Konkursaĵoj ne plu estos akceptataj post la 30-a de Novembro. Oni povas sendi la tekstojn rete (slipoj estu sendataj en apartaj mesaĝoj), al la adreso <sezonoj@yahoo.com>. Petu la sekretarion konfirmi la ricevon.

La laŭreato ricevos diplomon kaj libropremion, kaj la traduko aperos en antologio de anglalingva literaturo.

La organizantoj ĝis la 1-a de Januaro 2016 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la premiitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike. La kopirajto tamen restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizantoj en okazo de libroforma eldono.

Pli da informo ĉe Sezonoj [<http://sezonoj.ru/2013/09/liro-2013>].


Nova eldonaĵo

En Oktobro, aperis ĉe Esperanto-Societo Kebekia nova Esperanta libro *Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado*. Ĝi estas rakontaro fare de Louis FRÉCHETTE, grava kanada verkisto de la 19-a jarcento. La libro havas 130 paĝojn kaj kostas \$20 plus sendokostoj. Vidu la ĉi-numeran artikolon pri ĝi aŭ skribu al <francisko.lorrain@mac.com> por mendi.



Free downloads from the *retbutiko*

Several newly available downloads are now available free to members at our online bookstore [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]:



- **BUDHISMAJ RAKONTOJ 1**

Translated into Esperanto by Miaohui, read by Zhao Jianping. One of 50 stories from the Buddhist tradition in China. The ZIP file contains three files; the text of the story in PDF format, the spoken story at normal speed (7 mins 40 secs), and the spoken story at slower speed (10 mins 14 secs) for beginners. Free.

- **FONTO (Aprilo kaj Majo 1996)**

Fonto estis literatura revuo kiu aperas ekde Oktobro 1980. Ĝia enhavo konsistas ĉefe el literaturaĵoj originalaj kaj tradukitaj. Dum la 26-jara ekzisto de la revuo aperis en ĝi preskaŭ milo da noveloj, pli ol du mil poemoj, krome teatraĵoj kaj eseoj. Krom beletraĵoj aperis ankaŭ iom da recenzoj kaj aliaj artikoloj rilataj al literaturo. Senpaga por membroj; \$2.00 por aliaj.

Forpaso: Barbara Doris COLT

En Aŭgusto, membro Barbara Doris COLT forpasis

en Sanfrancisko. Ŝi havis 93 jarojn.

Barbara estis longtempa membro de la San-Franciska Esperanta Regiona Organizo (SFERO). Naskiĝinte en Haverhill, Masaĉuseco, ŝi diplomiĝis de Hampton Academy en 1937. Dum la dua mondmilito, ŝi servis en la usona virina armea korpuso ("WAAC") emeritiĝinte kiel stabserĝento post 20 jaroj.

Post sia militservo, Barbara elektis loĝi en Sanfrancisko, kaj aktiviĝis en la episkopa preĝejo de Sankta-Johano Evangeliisto kiel ĥorano, sekretario, kaj finfine (eble la unua virina) estrarano. Ŝi diplomiĝis de San-Franciska Ŝtata Universitato *magna cum laude* en la fako de politika scienco. Tie ŝi ankaŭ partoprenis la kursaron, kiu poste evoluigis en la nunan NASK. Lokaj samideanoj kare memoras ŝin kiel fidelan membron de ilia konversacia rondo.

Barbara aktivis ankaŭ pri politiko. Ŝi apogis la usonan Demokratian Partion kaj laboris en la unua kampanjo de Jerry BROWN por ŝtatestro de Kalifornio.

Ŝi estis avida leganto. Ŝia libraro enhavis librojn pri historio, biografio, lingvoj, religio, misteroj kaj sciencfikcio, kaj kompreneble Esperanto. Postvivas al Barbara ŝiaj gefratoj Jean kaj David kaj iliaj familioj. Ŝiajn cindrojn oni enterigis apud la patro kaj frato en Hampton, Novhampŝiro.

(Multan dankon al Ĉarli GALVIN pro la informo.)

Korespondi deziras

Mi estas 30-jaraĝa, nova esperantisto de Michigan. Mi volas korespondi pri arto kaj literaturo kaj ludi ŝakon per poŝto. Mi volas ankaŭ ekzerci min al Esperanto ĉar mi ne havas multan sperton. Bonvolu ludi ŝakon kun mi. Mia unua movo estos *e4*.

**Jeff Dell #476256, KFC,
16770 S Water Tower Dr, Kincheloe MI
49788**



An interview with William R. HARMON

Ĵenja AMIS

In issue 2013:4 we mentioned the tribute to William R. HARMON at this year's *Landa Kongreso* given in honor of the enormous contributions Bill has made over the years to Esperanto-USA (known also by its original name, *ELNA*).

Bill first learned Esperanto over 70 years ago, and he has been one of the most active members of ELNA since its foundation in 1952. In 1974, he established the current Central Office. Bill has been a board member and President of ELNA, Commissioner for Wills and Gifting, Commissioner for UEA affairs, *Ĉefa Delegito* to UEA on behalf of the USA, and Secretary in local groups like SFERO (*San-Franciska Esperantista Regiona Organizo*) and LOGO (*Ligo de Orientgolfaj Esperantistoj*).

In the 1970s, Bill lived for three years in Japan and was active in Japanese Esperanto groups. He has participated in many World Congresses and has lectured in China. Esperanto-USA made him an Honorary Member in 1992, and UEA did the same in 1998.

During the second World War, Bill even taught Esperanto to fellow shipmates in the Navy. He has worked for many years in transportation — for 17 years with the Santa Fe Railway, and after that for various sea transport companies. Bill is the author of *A History of the Esperanto League for North America* [<http://goo.gl/3iRJ0c>] and translator of *My Indian Boyhood* [<http://goo.gl/SAOOkp>] and *Stories of the Sioux* [<http://goo.gl/BklZD1>] by Chief Luther Standing Bear.

Below are excerpts from an interview Bill gave to Yevgenia Amis in 2005.

What motivated you to learn Esperanto and become active in the Esperanto movement at such a young age?

As an 11-year-old junior high school student in Los Angeles, I was overly curious about everything. One day I was walking down a hall at lunchtime and happened to notice through an open door a dignified-looking gentleman with a shock of white hair and a big gold tooth, reading something colorful while spooning up soup from a thermos. I went in and asked about the book, and it turned out

to be an Esperanto text from Poland. I asked and he answered a lot of questions, and I went away with some literature about Esperanto, my appetite whetted. His name was John Clewe, who was active in the Esperanto-Klubo de Los Angeles (EKLA). He was also a Christian Scientist, as was my mother, so before long she was letting him take me to the weekly club meetings at the Clifton Cafeteria in downtown LA.

I was also an avid reader of science fiction, and in that club I met kindred souls who later became quite important in that field — Forrie Ackerman among them. At 12 years of age I was sort of the “mascot” of the club. I had a LOT of teachers there — mainly Charles Chomette, Joseph Scherer, Paula and Don Parrish, and others. It was an exhilarating experience which set me firmly on the Esperanto track.



Bill with Sabrina the cat.

Could you briefly describe the American Esperanto movement when you became active in the late 1930s and early 1940s? What was different then, aside from the

available communication technologies?

At that early age, my knowledge in the '30s and '40s was limited to the activists in the Los Angeles area. There was a surprisingly large number of them, including those living in Long Beach, Orange County and other environs.

I didn't have any money, so I didn't join any organizations (other than EKLA). Later, in 1943 I think, I did join the Esperanto Association of North America (EANA). Through reading *Amerika Esperantisto* (AE), the organ of EANA, I became aware of other local and regional organizations. I also conducted a lively correspondence — usually by postcard — with Esperantists in other countries, whose addresses I got from AE. I even played chess with someone in Vladivostok, losing badly. I later found out that I was actually playing the entire Vladivostok Chess Club... no wonder I lost.

During WWII you served in the Navy and even taught Esperanto on the ship where you served. Was there much interest in Esperanto among the sailors? Did you contact local Esperantists in the countries you visited?

I joined the U.S. Navy in 1944, and after some training was posted to the USS *Franklin D. Roosevelt* (CVB42) which was being fitted out in Newport, Rhode Island. I was then a Yeoman 3rd class and was soon in charge of a pre-commissioning office that combined quite a few elements. I'm told that I gained some fame in Newport for my telephone-answering patter: "Navigation, education, welfare and recreation, legal beagle, small stores and the chaplain's office is right next door, Harmon speaking, sir!"

I was still corresponding with a number of foreign Esperantists, and when the Roosevelt took its shake-down cruise to the Caribbean and Brazil, I made arrangements to meet Esperantists in Rio de Janeiro. It did not escape the notice of my shipmates that Harmon had a number of people waiting for him on the pier, including a few nubile females. Explanations later led to an Esperanto class on the ship. Later, on voyages to the Mediterranean area, I met Esperantists in Lisbon, Marseilles, Piraeus Greece, and North Africa.

ELNA is now more than 60 years old, and you've been involved with it since the beginning in 1952. How did it start?

The history of the origin of ELNA is covered thoroughly in my book, *History of the Esperanto League for North America* which is available from the Book Service. Very briefly, ELNA was born of a rebellion by a number of EANA members against the oppressive and dictatorial attitude and actions of the then president of EANA, George Alan Connor. In 1955, because of his continuing diatribes against UEA and its leaders, Connor became the first — and only — member expelled from UEA. EANA then withdrew its affiliation with UEA, and ELNA was named the U.S. affiliate shortly thereafter by UEA. Those interested in more detail on this are referred to the *History*.

In the 1950s I was still putting in 6-day weeks at the Santa Fe and didn't have a lot of time for extracurricular activities such as Esperanto, apart from founding (with Bill Wanzer) an Esperanto club in Long Beach. I joined ELNA at the outset and have been a member ever since.

It must have been difficult for an organization like ELNA to work without a central office for more than 20 years. How has the situation in changed since it got its own CO and Director?

First of all, although I established the central office in Emeryville in 1975, that was not the first central office; the Schulzes had found a small office over a bank in San Mateo in 1972, with Charles R. L. Power as the first director. I strongly suspect that the Schulzes also anonymously paid the rent and at least part of Power's salary. I had a lot of discussions with the Schulzes during the early 1970s, and found that we three were absolutely in harmony with respect to the need for a dependable central office for ELNA's continued existence. Cathy Schulze played a key role in keeping things together prior to establishing that first central office, coordinating correspondence between the various working groups, and starting an Esperanto book service (located in a bedroom of their Hillsborough home at first). Generally the elected officers coordinated the activities of ELNA in the 1950s and 1960s —

outstanding were Frank Helmuth and Conrad Fisher in that regard.

Through the efforts of a great many people some sort of newsletter got published occasionally during that time. Newsletters to the members are extremely important to the morale and stability of any organization. Among the editors during that period were Dave Richardson, Ferd Carlson, Donald Broadribb (in Australia!), and Robert Davis. Money was always a problem. ELNA had no significant financial backing, and the hat was passed almost constantly to keep afloat, but ELNA's members never failed to provide enough for a starkly bare existence. Mark Starr and Margot Gerson in New York founded the "Esperanto Information Center" (EIC) in 1964 to ease the burden on ELNA. In early 1967 the ELNA Board had to suspend publication of the newsletter, and made a deal with EIC to produce one until ELNA had the resources to pick up the pace again.

I just plodded along tenaciously, keeping people working, trying out something new if it looked promising. Some of those things worked. Others didn't. Money was always a problem.

You lived in Japan in the mid '70s and were active in different Japanese Esperanto Organizations. How do the American and Japanese Esperanto Movements compare? Are there more similarities or differences?

I was sort of "commuting" to Japan during the late 1960s as Matson's Manager of Pricing, working out rules for containerization with other shipping lines in the conferences there. I had a lot of time to meet and befriend Japanese Esperantists — including my "older brother" Ken Kawakami and my "younger brother" Yoshimi Umeda. After moving to Tokyo in 1972 for a 3-year stint as a manager of United States Lines, our social life became almost totally centered on Esperantists and Esperantist groups there. I found myself wishing that the U.S. could have such a coherent and large active group! Of course Japan had the edge, as there the population is pretty much concentrated in a relatively few locations; while in the U.S. Esperantists are almost a diaspora. Japan has several separate regional organizations — in Tohoku, Kansai, Kanto, and other areas; but JEI —

the *Japana Esperanto-Instituto* — welds them together with an annual all-Japan conference. Wish we could do that here!

You've been a Board Member of ELNA for a total of 35 years (1958-1960) and (1966-1997), and also its President (1976-1981). What were the main achievements of the organization during that time?

I was merely one among many serving in high office in ELNA. Perhaps my talent for organizing and finding people for the many jobs within ELNA did play some sort of role. Looking back, it is difficult for me to pinpoint any "milestones" during my tenures. I just plodded along tenaciously, keeping people working, trying out something new if it looked promising. Some of those things worked. Others didn't. Money was always a problem. Somewhat later, John Massey provided a very generous donation to found a Capital Endowment Fund, to help assure ELNA's continued existence. That Fund has now grown to a third of a million dollars, and its yearly income helps pay the bills. (Hint: Donations or bequests to the ELNA Capital Endowment Fund are always welcome!)

Apart from ELNA, you also were (and still are) very active in the World Esperanto Association – UEA, which made you an honorary member in 1992. Could you say more about your activities in UEA?

Aside from being Chief Delegate, while a Committeeman I served six years as Chairman of the Nominating Committee, which seeks out appropriate candidates for the top offices of UEA. It is reported to be the toughest job in UEA. I am proud of the fact that during my tenure, UEA elected two non-European presidents: Lee Chong Yeong of Korea (second Asian president) and Keppel Enderby of Australia. Both served UEA well. I'm not quite sure why UEA honored me with the Honorary Member title — there were many others who did more than I did; but I was a faithful worker in the vineyards for many years, and I suppose that I must have gained a certain reputation among the other Committeemen. In any event, I am proud of the distinction, and of the Honorary Member

distinction awarded to me by ELNA.



Bill and Lucy Harmon.

Your wife Lucy is a very active Esperantist. How did you meet? Are any other members of your family Esperantists?

We'd need a whole new article or issue for me to fully answer this about Lusi. She has done a truly amazing thing in producing the 16-lesson video course *Esperanto Pasporto al la tuta mondo* [<http://goo.gl/LWufA9>]. She found the author, found the cast (all of whom worked without pay), found the perfect director (Judy Montell), almost single-handedly raised the sum of over \$300,000 to make filming and production possible. She interlaced the filming with the classes at SFSU to provide a steady stream of extras. She pulled rabbits out of hats constantly. I'm truly proud of her.

How did we meet? We've been married for 43 years now, but I still remember the first time I saw Lusi at a Democratic party after an election in Southern California. We were married shortly thereafter and have been teammates ever since. As to other family members, only my grandson Justin has seriously taken to Esperanto, although I sent several others to Esperanto courses including those at SFSU. (And talk about *edzperanto*, Justin nearly married a beautiful Hungarian girl whom he met at the SFSU courses!)

Mekaro-2014 en nova urbo

En 2014 Mez-Kanada Renkontiĝo (Mekaro) okazos en urbo kie ĝi neniam antaŭe okazis: Ŝerbruko (Sherbrooke), Kebekio. Estas la sesa plej grava municipo de tiu kanada provinco kun ĉirkaŭ 154 000 enloĝantoj. Ĝi situas en la tiel nomataj Orientaj Kantonoj (*Eastern Townships*) en tre bela regiono fama pro ĝiaj lagoj, riveroj kaj montoj, 43 mejlojn norde de la landlimo kun la usona ŝtato Vermonto (kiu similas al suda Kebekio). La distanco inter Montrealo kaj Ŝerbruko estas 98 mejloj, do ĝi estas facile atingebla per aŭtovojo en aŭtomobilo kaj aŭtobuso.



Universitato Bishop's en Ŝerbruko, ejo de Mekaro-2014

Mekaro allogas multajn usonanojn ĉiujare. La pasintan jaron, en Otavo, partoprenis usonaj el la urbo Bellevue en Vaŝingtonio, Tonawanda en Novjorkio, kaj Waltham en Majno; do ŝajnas ke multaj personoj ne timas la distancojn por kuniĝi kun samideanoj.

Ĉi-jare la renkontiĝo okazos en unu el du universitatoj de Ŝerbruko: Universitato Bishop's, la anglalingva universitato konstruita laŭ la stilo de tiu en Oksfordo, Anglujo; Bishop's estas ankaŭ unu el la plej malnovaj de tuta Kanado (1853). Malgraŭ ĝia aĝo, Bishop's proponas al kongresanoj plej modernajn kaj komfortajn instalaĵojn. La mekaranoj povos loĝi en 4-ĉambraj apartamentoj. Ĉiu

apartamento inkluzivas du kompletajn banĉambrojn, kuirejon, manĝejon kaj salonon. La apartamentoj povas gastigi maksimume 5 homojn kaj ĉiu ĉambro havas sian propran ŝlosilon.

Oni povos matenmanĝi en la universitata manĝejo je favora prezo kun varma kaj malvarma bufedo. Nova aspekto estos la dimanĉvespera bankedo en speciala halo de la universitato.

Mekaro-2014 komenciĝos sabaton la 17-an de Majo kaj daŭros ĝis lundo la 19-a. La programo estos varia sed laŭ la mekara stilo: turismo, komunaj manĝoj kaj multe da babilado. La vizitantoj malkovros tiun regionon koloniitan komence de la lojalistoj, kiuj fuĝis el Usono post ties sendependiĝo por resti fidelaj al la brita krono; ili ricevis terenojn en suda Kebekio kaj fondis novajn komunumojn. Tiuj lojalistoj estis sekvitaj de aliaj enmigrintoj britaj, skotaj, irlandaj kaj fine de franckanadanoj. Nun la Orientaj Kantonoj estas majoritate loĝataj de francparolantoj pro la konstanta malkresko de la anglaparolantaro. Estas iom strange konstati, ke en multaj lokoj kun anglaj nomoj kiel *Warwick*, *Drummondville* kaj *Thetford Mines* oni aŭdas preskaŭ ekskluzive la francan (laŭ la franckanada dialekto).

Por havi pli bonan ideon pri la programo proponita de Mekaro-2014, konsultu la Mekaro-retejon [<http://mekaro.ca>]. Estas tie multe da informoj pri la maniero atingi la Ŝerbrukon, kie loĝi kaj kion fari. La lokaj gastigantoj faros ĉion necesan por ke vi estu bonvenaj kaj kontentigitaj. Ne hezitu meti demandojn laŭbezone. Ni esperas, ke la usonaj samideanoj kiuj kapablos veni Ŝerbrukon prenos tiun decidon por riĉigi nian eventon!

Ĝis revido en Ŝerbruko!

— *Trefflé (Trefleo) MERCIER*
Kunordiganto de Mekaro 2014
<trefle@ymail.com>

Ju pli multe... des pli bone

Impresoj pri la 13-a Meksika Kongreso de Esperanto

Orlando E. RAOLA

Ankoraŭ iomete laca sed tute feliĉa, mi ŝatus rakonti al vi pri mia aventuro dum la semajnofino, kiam mi havis la eksterordinaran ŝancon partopreni la 13-an Meksikan Kongreson de Esperanto en la ĉefurbo de nia suda najbaro.



Inaŭguro sub la suno

Okdeko da aliĝintoj el pluraj lando kunvenis sub la temo “Agadoj por pli bona mondo”. La kongresejo estis la altlernejo Regina, kiu troviĝas en tre malnova sed tute renovigita konstruaĵo meze de la urbo. La kutimaj programeroj ne mankis: interkona vespero en restoracio Isabel, multaj interesaj prelegoj, arta vespero en iom malproksima sed tute adekvata teatrejo, adiaŭan feston en la domo de lokaj esperantistoj...

Se mia raporto estus limigita al la supra alineo, vi verŝajne scius iom pri la meksika kongreso, sed mi restus tute forkonsumita pro honto kaj maldankemo. Fakte, mia tasko nun estas reverki la alineon zorgeme, kaj klopodi ke ĉiu vorto kaj esprimo transdonu la senbridan entuziasmon, la vibrigan energion, la kortuŝan bonkorecon kaj la esperigan inspiron, kiuj kunformas la sperton travivitan de mi dum tiuj ĉi kvar neforgeseblaj tagoj.

Unue, la urbo mem. Pri Meksikurbo mi sciis

absolute nenion. Tute nekomprenebla afero por denaska hispanlingvano, ĉar ĝi estas la plej granda kaj grava hispanparolanta urbo en la mondo. Sur tiu alta valo, kie iam staris la mitoplena Tenoĉtitlano, nun loĝas dudek milionoj da homoj, kiuj kunformas la plej mirindan, belan, vivantan, eksterordinaran kaj senliman urbon kiun mi iam ajn vidis en pli ol du jardekoj de vojaĝado tra la mondo. Bonvolu ne misinterpreti tiun ĉi aserton: mi amas Havanon, mi estis absolute ravita siatempe de Budapeŝto kaj Berlino; Tokio, Kioto kaj Hanojo estas ankaŭ tre korkaraj lokoj kaj Bonaero estas simile grandioze bela metropolo. Sed mi estis tiom profunde ensorĉita de mia mallonga vizito al Meksikurbo, ke mi timas mian malkapablon ĉi-momente objektive juĝi kaj kompari urbojn kaj etosojn. Mi nur sincere esprimas mian nunan animstaton.

Sur tiu fono, mi venis al kongreso kie plejparto de la partoprenantoj estas tre junaj homoj, multaj el kiuj flue esprimas sin en Esperanto. Troviĝis ankaŭ komencantoj kaj eklernantoj, sed la ĝenerala etoso estis rimarkinde senkrokodil(ig)a. La interkona vespero estis ne vere tradicia, ĉar ĝin anstataŭis vigla kunmanĝado en restoracio. Ho! Manĝi en Meksikurbo! Mi devus verki tute apartan artikolon por priskribi ĉion kion mi manĝis, kiom multe mi ŝatis ĉion, kiom profunde aliĝis mia juĝo pri la meksika kuirarto kaj manĝokutimoj, estigita en la pasinteco de la tropicaj manĝaĵoj en restoracioj funkciigitaj de meksikaj enmigrintoj en mia loĝregiono. Tiu kunmanĝado daŭris kelkajn horojn, kiam la homoj venis, kunparolis, kunmanĝis, adiaŭis, kaj poste venis aliaj homoj, kaj daŭris la festena etoso, la babilado, la tostoĝis la kelneroj ĝentile memorigis nin, ke estis tempo iri hejme.

Sekvamatemne, la solena inaŭguro, kaj alia nekutimaĵo: ĝi okazis ĉe la tegmento de la konstruaĵo atingebla per impona ŝtuparo (nur tie ĉiuj partoprenantoj povis esti kune) kaj sub brilegaj sunradioj. Mi ŝatus konsulti la esperantajn historiistojn, ĉar mi suspektas, ke eble temas pri la

unua (aŭ unu el la malmultaj) landaj kongresoj “je plena suno”. Mi salutis la partoprenantojn nome de la usona esperantistaro, kaj mi certigis, ke la kunlaboraj rilatoj, la amikeco kaj bonvolo inter la esperanto-movadoj de niaj du landoj daŭre kreskos kaj disvastiĝos en la estonteco. La prezidantino de Meksika Esperanto-Federacio Mallely MARTINEZ dankis al la respondeculinoj de Regina la gastigadon de la kongreso kaj multaj trapasintoj de la KER-ekzamenoj ricevis tie la atestilojn.

Prelegoj sekvis. Mi havis la honoron esti la unua preleganto. Sekvis multaj aliaj interesaj kaj eĉ ege surprizaj prelegoj pri temoj variaj. Inter ili mi elektis partopreni tiujn pri rilatoj inter juro kaj Esperanto (Luis CORDOVA), pri orboj, nekonataj lumiĝantaj objektoj nur videblaj per fotado (Joaquín ROSILLO), pri la Strategia Plano de UEA (Martin SCHÄFFER), Vegetarismo por plibonigi la mondon (Victor SOMBRA), kaj Vojaĝo al Gvatemalo (Marc SHAFROTH, la unusola kroma usonano en la kongreso, kun kiu mi havis longan interparoladon klopodante konvinki lin pri la avantaĝoj ricevitaj per aliĝo al Esperanto-USA, kie li ne membras). Mia amiko Luis Cordova diligente registris plejparton el la prelegoj, vi povas mem aŭskulti ilin ĉe la retejo de *Internet Archive* [<https://archive.org/search.php?query=subject%3A%22MEK+2013%22>].




Saluto de usonaj esperantistoj al la kongresanoj

Sabate vespere, post malfacila tranavigado en urbo dum la horoj kiam la homa svarmo montriĝis

senfina, ni alvenis al teatrejo, kie la arte vespero iom malfrue komenciĝis. Agrable surprizis min denove profesia folkloro danc-trupo, esperantaj muzikantoj (frato kaj fratino kiuj regalis nin per ege moderna kaj frapanta muziko), kaj precipe la teatraĵo *La Vermeto*, kun ĉarmaj infanoj kiuj bone kaj kompreneble parolis esperanton kaj per ĝi transdonis mesaĝon pri la valoro revadi kaj obstini en la realigo de la revoĵo.

Por la fino, la plej grava: danke al senlaca kunlaboro de la tuta familio Rosillo-Vega Acosta (Joaquin, Gudalaupe, la infanoj de Joaquin, la gefratoj, ĉiuj) okazis la adiaŭa festo por la tuta kongresanaro. Denove la frandaĵoj abundaj, rivereca fluo de tekilo *Esperanto*, muziko korgajiga... sed plej rimarkinde kaj grave: senhalta kaj senhasta montrado de amo, sincera, ĝiskora, nin ĉiuj kunliganta, kaj kiu faris la adiaŭon des pli malfacila. Ne supozu, ke mi menciis ĉion, mi emas nur reliefigi la plej gravajn agadojn kaj homojn, sed multaj aliaj partoprenis, kune kreis etoson vere ĝuindan dum la tuta daŭro de la kongreso. Mi certe invitis plurajn el la junaj meksikaj aktivuloj veni al ni por eventoj kiel NASK [*Nord-Amerika Somera Kursaro*] aŭ nia nacia kongreso, kaj nun kiam la kontakto estas jam establita, mi esperas, ke ni povu helpi al ili viziti la Nordon en la estonteco.

Karaj gelegantoj: venontfoje, kiam vi aŭdos pri Esperanta kongreso en Meksiko, klopodu ne maltrafi la okazon deproksime sperti vian energian kaj entuziasman najbaron. La vizito efikos bone kiel kuracilo por ajna pesimismo aŭ malcerteco rilate la estontecon de Esperanto en nia kontinento.



Orlando E. RAOLA


Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

<oraola@gmail.com>

ESPDIC: The Esperanto-English Dictionary Project

Paul DENISOWSKI

ESPDIC is an online Esperanto-English dictionary project that documents Esperanto from a descriptive (rather than prescriptive) point of view. As such, it contains many alternate and rarely-used terms not found in more traditional dictionaries. Readers of ESPDIC can help advance the project by contributing corrections and additions.



To explain ESPDIC's history and goals, we've invited compiler Paul Denisowski to present an overview of the project. You can also visit the ESPDIC home page [http://denisowski.org/Esperanto/ESPDIC/espdic_readme.htm] to search the online dictionary and learn more about ESPDIC.

Background

Dictionaries have always been one of the most important tools in language study, both for the beginner and the advanced learner. This is especially true for students of Esperanto, since opportunities to learn vocabulary and usage from other speakers or from print/media are much more limited than in the case of national languages.

Fortunately, a number of good Esperanto-English dictionaries have been available for some time. Butler's *Esperanto-English Dictionary* (1967) was one of the more comprehensive dictionaries available for many decades, and Wells' *Teach Yourself Esperanto Dictionary* (1969) was recently updated (2010) and is available in both softcover and hardcover.

Paper dictionaries do however suffer some drawbacks, primarily in terms of portability and speed. Carrying a paper dictionary (much less multiple dictionaries) in one's pockets or bag is not always practical, and manually searching for a given term can be time-consuming. Electronic dictionaries, which do not suffer from these limitations, have existed since the beginning of the

computer age, but in the past these were often too small to be useful – it is, after all, the less common terms that one tends to look for in a dictionary.

Electronic Dictionary Projects

Fortunately, the growth of the Internet has enabled of a number of successful electronic dictionary projects. Possibly the most successful of these has been Jim Breen's EDICT Japanese-English dictionary. Started in 1991, EDICT now contains over 160,000 entries, most of them contributed by the user community, and has been integrated into a large number of web pages and applications.

As a contributor to EDICT, I became interested in starting a similar project for Chinese and launched the CEDICT Chinese-English dictionary in 1997. The original core of this dictionary was made up of vocabulary lists from various Chinese textbooks (about 1,200 entries total), to which were added words and expressions I came across while reading. When the dictionary reached approximately 20,000 entries, I began making it available on my website and asked for user contributions. The dictionary has now grown to over 100,000 entries.

Launch of ESPDIC

Since my early days as an Esperantist in the mid 1980s I had been keeping (in paper notebooks) lists of words and phrases I came across in my studies and reading. Several years ago I began converting these to electronic format as well as compiling vocabulary lists from Esperanto textbooks. I then began to supplement this proto-dictionary with word lists found on the Internet and released the first version of ESPDIC in May 2011. Since then the dictionary has grown rapidly and as of July of 2013, ESPDIC has over 60,000 entries.

A note to students and instructors

Unlike most *prescriptive* dictionaries used in teaching, ESPDIC is a *descriptive* reference, and thus contains many terms that are not considered standard usage. That is, not everything students find in ESPDIC will be “correct” from an instructor’s standpoint.

This caveat isn’t meant to belittle the value of ESPDIC as a language resource, but it may not be suitable as a primary reference for new students. As when using other English-Esperanto dictionaries, students may need to cross-check their findings in a dictionary that provides definitions (see below).

Other online dictionaries that new students may find useful:

Lernu! [<http://en.lernu.net>]

Lernu! offers a free, concise dictionary which students can search for equivalent terms in English, Esperanto, and other languages.

Bildvortaro [<http://en.lernu.net/lernado/vortoj/bildvortaro/>]

Also from *Lernu!*, this picture dictionary is great for finding words by topic.

Wells: English-Esperanto-English

[<http://books.google.com/books?id=f0Zunqj2fa0C>]

The authoritative Esperanto-English dictionary by John Wells is also available in electronic form. Thanks to Google Books, students can search the contents for free.

ReVo [<http://reta-vortaro.de/revo/>]

The extensive *Reta Vortaro* has concise English equivalents for many Esperanto words, along with comprehensive definitions in Esperanto.

Pilger: Bazaj radikoj [<http://pilger.home.xs4all.nl/breo-au8.htm>]

Wouter Pilger’s dictionary defines each of the 2,500 roots from the Academy’s *Baza Radikaro* in simple Esperanto. While it lacks English translations, it is especially useful for beginners. Also available in printed form [<http://goo.gl/CFRtqO>].

Progresantoj may want to check out the article *Vortaroj, vortaroj* by Steven Cybulski in issue 2011:1. Steven provides links to variety of online dictionaries suitable for students who have progressed beyond a beginner’s course.

There are several criteria I use for adding entries to ESPDIC. Although the greatest strength of Esperanto is the ease of deriving words and coining expressions based on roots and affixes, the most important rule is that I never add my own creations into ESPDIC – all entries must come from other (primarily printed) sources in the Esperanto community. The converse is that (generally speaking) the dictionary is descriptive, not prescriptive: it simply captures the words and expressions that are being used in Esperantujo rather than trying to suggest or dictate “proper” usage. One goal of ESPDIC is also to include rare, unusual, or technical words, as these are also unlikely to be found in most other Esperanto dictionaries.

The latest version of ESPDIC (as a single text file) can be found at on the ESPDIC home page [http://denisowski.org/Esperanto/ESPDIC/espdc_readme.htm]. It also contains additional information about the project as well as a simple interface for searching ESPDIC online.

Role of technology in ESPDIC

Although the Internet has been the greatest technological enabler of ESPDIC, custom software tools have also played a critical role in the development and maintenance of the dictionary. In the early phases of the dictionary I developed Perl scripts for the more mundane tasks of resolving duplicate entries, sorting the dictionary (in Esperanto alphabetical order), and detecting common formatting errors. Current tools development is more focused on leveraging various external resources, such as checking ESPDIC entries against search engines and flagging for review those entries with very low hit counts. Additional tools will provide checking against other dictionary resources (e.g. finding words in the PIV [*La Plena Ilustrita Vortaro*] but not defined in ESPDIC) and parsing of texts (such as the those from Project Gutenberg) in order to flag undefined words and expressions. Despite the substantial benefits these tools provide, they cannot replace human proofreading and editing – more on this below.

Use in other projects

ESPDIC is licensed under a Creative Commons

Attribution 3.0 Unported License. What this means is that anyone can use, transmit, or modify ESPDIC for any purpose, including commercial purposes, as long as the source is properly attributed. The format and licensing of ESPDIC was designed to facilitate its use in a wide variety of projects.

In addition to a simple search interface on the ESPDIC home page, there are a growing number of applications which make use of ESPDIC. And despite the fact that my initial expectation was that ESPDIC would be used in projects that are electronic in nature, I'm very pleased to note that TWO printed versions of ESPDIC have already been published to date. It is my very sincere hope that the Esperanto community will be able to leverage ESPDIC in many more ways in the future.

Future direction / call for volunteers

Now that ESPDIC has reached over 60,000 entries (the size of a "large" printed dictionary), I plan to concentrate efforts in two main areas: usage examples and proofreading / editing of existing entries.

One shortcoming of many dictionaries (Esperanto and otherwise) is that lack of usage examples, i.e. how words are used in common phrases and contexts. In addition to "tempo = time" a dictionary should also have examples of common constructions and phrases using this word. To this end, ESPDIC contains entries such as "de tempo al

tempo, dum restas tempo, ĝis la nuna tempo, je reala tempo, kuro kontraŭ la tempo", etc. While reading or listening to Esperanto I usually jot down any new or "interesting" phrases that I hear, and I would highly encourage Esperantists to consider gathering and submitting their own "finds" to the ESPDIC project – this is an area in which experienced Esperantists can make a tremendous contribution.

Although I have manually read through the entire dictionary at least twice and regularly make changes and corrections to existing entries, there is also a real need for skilled Esperantists who are willing to check entries and suggest any necessary corrections or additions. No level of participation is too small – even a single entry or edit is welcome and all contributors will be acknowledged.

"Vortaro, tio estas la tuta universo laŭ alfabeto ordo"

— Anatole FRANCE

Paul DENISOWSKI

Paul is an Applications Engineer from the Raleigh-Durham area of North Carolina. In addition to Esperanto he has studied Latin, Japanese, Vietnamese, Biblical Hebrew, New Testament Greek, and Interlingua.

<paul@denisowski.org>

Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado

François LORRAIN

Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado

Louis FRÉCHETTE

Rakontoj por homoj el ĉiuj aĝoj, verkitaj de grava kanada aŭtoro de la 19-a jarcento. Dua eldono. Mola bindaĵo. 130 paĝojn. 2013. Kanado. **\$20 + sendokostoj.**



Por mendi, skribu al
<francisko.lorrain@mac.com>.

Aperis en Oktobro, ĉe Esperanto-Societo Kebekia en Montrealo, nova Esperanta libro: *Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado* de Louis FRÉCHETTE [lui freŝet], grava kanada verkisto de la 19-a jarcento .

Fréchette vivis de 1839 ĝis 1908. Li studis juron en Kebeko, sed poste dediĉis sin ĉefe al poezio, ĵurnalismo kaj eĉ politiko. Li tamen publikigis kelkajn prozajn librojn — interalie tiun kristnaskan rakontaron, kies angla versio, de li mem verkita, aperis en 1899 sub la titolo *Christmas in French Canada* (Toronto, George N. Morang). Jaron poste aperis franca versio de la sama rakontaro, *La Noël au Canada*, ĉe la sama eldonejo. Kelkajn el tiuj rakontoj li verkis originale en la angla kaj poste francigis, kaj la aliajn li verkis france kaj mem angligis. Do li verkis ambaŭ versiojn mem! Fréchette sufiĉe bone scipovis la anglan, loĝinte en Ĉikago kelkajn jarojn.

Li estis progresema homo, defendante, ekzemple, respublikismajn ideojn, dum Kanado estis parlamenta monarĥio, parto de la brita imperio, do sub la regado – tiam ne tiel formala, kiel ĝi nun fariĝis – de la brita krono.

Liaj rakontoj ne celas ĉefe infanojn, sed male homojn el ĉiuj aĝoj. Kelkaj el la rakontoj partoprenas, stile aŭ enhave, en la buŝa popolrakonta tradicio tiam tre disvastigita tra la tuta franca Kanado: ofte, dimanĉe postmese, aŭ dum longaj vintraj vesperoj, kunvenis homoj por aŭskulti

rakontiston, lokan aŭ vojaĝantan. La aliaj rakontoj de Fréchette disvolviĝas en kadro pli “moderna” — tamen kompreneble 19-a-jarcenta.

Jen elĉerpaĵo el la rakonto *Tom Karibu’*, en kiu Fréchette prezentas la popolan rakontiston Joĉjo Violono (p. 79–80):

Joĉjo Violono estis kurioza tipo de homo, tre interesa kaj populara, kiu pasigis sian junecon en la arbohakejoj, kaj multe ŝatis rakonti siajn vojaĝaventurojn en la nordaj regionoj, la arbokovritaj lignoj de la riveroj Otavo, Gatineau kaj Sankta-Maŭrico.

Li estis, tiun tagon, aparte inspirata.

Tiun matenon, li estis oficinta kiel “kunpatro”, t.e. baptopatro de novnaskiĝinta etulo; kaj, ĉar la ceremoniaj akcesoraĵoj iom ŝveligis per dolĉa venteto la velojn de lia natura elokvento, liaj rakontoj mirinde antaŭeniris.

Kompreneble ĉiam temis pri okazaĵoj en hakistejoj kaj arbaroj: pugnaj bataloj, viktimoj, eksterordinaraj fiŝkaptoj, miraklaj ĉasosukcesoj, vizioj, sorĉado, ĉiuspecaj prodaĵoj; lia kolekto ampleksis rakontojn por ĉiuj gustoj.

“Bonvolu diri al ni kristnaskan rakonton, Joĉjo, se vi konas tian, por okupi la tempon, ĝis ni ekiros al la preĝejo,” ekkriis junulino nomata Femia Boisvert.

Kaj Joĉjo Violono, kiu fieris scii, kiel montri respekton al la bela sekso, tuj respondis per la karakteriza formulo ĉi-supre prezentita. Tiam, malsekiginte sian gorĝon per fingrodiko da jamajka rumo, kaj ekfajriginte sian pipon je la kandelo, per unu el tiuj longaj cedraj splitoj antaŭe uzataj de niaj kamparanoj, kaj eĉ post la invento de fosforaj alumetoj, li malfermis sian rakontadon per la sekvaj vortoj:

Mi volas diri al vi, geamikoj, ke, tiun jaron, ni dungigis por flosigi arbotrunkojn super Bytown, ĉe la forko de malgranda rivero nomata La Skabiulino, stranga nomo, sed sen rilato kun tio, kion mi rakontos.



“Tom Karibu’ komencis malsupreniri la arbon”, F. S. COBURN, 1899

Unua Esperanta eldono de la libro aperis en 1972, en traduko de la kebekurba esperantisto Vincent BEAUPRÉ (1914–1984), kiu multe aktivis, ne nur en Kebeko, sed ankaŭ en Kanada Esperanto-Asocio. Tiu eldono ne estis presita, sed nur tajpita kaj multobligita.

Iniciatis la projekton reeldoni tiun rakontaron Zdravka METZ el Montrealo, en 2008. Francisko LORRAIN, same el Montrealo, funde reviziis la tradukon de Beaupré, kaj poste kontrolis ĝin Bruce CRISP (Otavo), Giorgio DENTI (Romo) kaj Trefleo MERCIER (Ŝerbruko).

Tiu dua eldono, kiel la unua, enhavas nur la ses plej bonajn rakontojn el la dek du originalaj. La tekston akompanas la elstaraj ilustraĵoj, nigraj-blankaj, de Frederick Simpson COBURN, ciferigitaj el la originalaj eldonoj de 1899 kaj 1900. Coburn [<http://fscoburn.com>] estas grava kanada pentristo, konata ankaŭ kiel ilustristo de libroj. Helpe al nia antaŭvideble internacia legontaro, ni aldonis piednotojn pri ĉiaj temoj – historiaj, geografiaj, kulturaj, lingvaj, religiaj... – kaj mapojn montrantaj la multajn lokojn menciitajn en la rakontoj.



François LORRAIN

Francisko estas sociologo kaj matematikisto, nun emerita. Li loĝas en Montrealo, Kanado.

<francisko.lorrain@mac.com>

senintenca esperantaĵo?



La nomo de tiu ĉi nova skribilo-marko estas tiel konvena esperantaĵo, ke ni devas demandi: ĉu ĝi vere estas *senintenca* aŭ ne?



Ĉu vi volas razi al vi la kruojn? Helpe de *POVOS*, vi povos! Ni dankas al Liĉjo MILLER, kiu kompleze sendis la jenan foton de kruro-razilo kun kuraĝiga nomo. (Ni ne kuraĝis demandi, kial Liĉjo havas kruro-razilon.)